



# 'Nova Urbo'

UNUECO TRANS ĈIUJ KULTUROJ

> ni Pontu <

## La finna vojo

Por ke ĉi tiu numero de “NU” atingu niajn legantojn ankoraŭ dum la 104a Universala Kongreso, ni sendas intertempe tiun ĉi materialon pri kelkaj interesaj flankoj de la finna vivo. Jen io agrabla kaj facila: verŝajne la plej populara danco de Finnlando. Unue do vi aŭskultos la muzikon, sekve rigardos la aliajn danci kaj fine /finne vi mem eble tion provos?




Temas ĉi tie pri letka-jenka (finne: *Letkajenkka*) la danco, kiu baziĝas je folkloro de Finnlando. Originale, oni nomis ĝin simple “jenka” – esperante: jenko / jenkao? – kiu apartenas al sufiĉe rapidaj dancoj. Tamen ĝia ritmo estas tre simpla, simila al tiu de ĉeĥa “polka”.

Ĉiuj artikoloj vi troveblas ĉe:  
<https://familiaro.com>

## Sisu, peno kiu fortigas

La vorto “sisu” enhavas la specifan, preskaŭ mistikan sencon, kiu rilatas al finna nacia karaktero kaj verŝajne ne ekzistas unuvorte en aliaj lingvoj. La unikeco de tiu ĉi vorto malebligas rektan tradukon al aliaj lingvoj. Tial, ne povante ĝin esprimi plej koncize, oni uzas por tio aron de ecoj kiel ekz: persisteco, rezistopovo, fortikeco, risortemo /vivenergio aŭ harditeco (malmoleco).



Pri sisu aperas pli kaj pli da libroj kaj periodaĵoj. En lastaj jaroj popularas libro de Katja Pantzar. Naskiĝinta en Kanado, ŝi decidis vivi en la lando de siaj finnaj gepatroj. Ŝia libro montriĝis sukcesa kaj tradukita al kelkaj lingvoj. Tie la aŭtorino promesas, ke per sisu oni akiros bonfarton, kuraĝon kaj feliĉon. Eble ŝi konvinkis multajn legantojn, ĉar tiu libro estas jam tradukita al kelkaj lingvoj.



## Nepalo – konstruado de pontoj

Ni ĉiuj rimarkas, ke – dum eventoj, vojaĝoj aŭ privataj kontaktoj – okazas ofta renkontiĝo kun homoj el diversaj nacioj. Tio ebligas rekte lerni pri aliaj kulturoj, sed ankaŭ donas la ŝancon prezenti nian propran kulturon kaj tradicion. Esperante oni povas kompari tian proceson al konstruado de interkulturaj pontoj.



Tio estis la unika oportuno interŝanĝi valorojn de la malsamaj kulturoj. La gastoj lernis multe pri problemoj kaj ĝojoj de la loka loĝantaro. Estis tre interese observi kiel tiuj homoj vivas en la severa naturo kaj helpas unu la alian solidare. Tio gvidis al pripensoj: kion fari ke ni ĉiuj povu vivi amikece en harmonio kun la naturo kaj kun niaj najbaroj?



La novan tipon de turismo realigas malgrandaj grupoj kiu vojaĝas al malproksimaj teritorioj por konatiĝi kun novaj kulturoj. Tie ili kunloĝas en vilaĝoj kaj lernas pri tradicioj kaj vivstilo de diversaj, ofte indiĝenaj komunumoj.

---

## Kurso por junaj afrikanoj

“Trovu vian pasion, kia ajn ĝi estas. Eniru ĝin kaj faru, ke tio fariĝos parto de via vivo. Tiam vi ekvidos, ke grandaj aferoj okazas al vi kaj pro vi”. Tiuj ĉi vortoj de Allan Armstrong resumas atmosferon de la kurso okazinta en Nairobi (eo: Najrobio), la ĉefurbo de Kenio.



Tiu renoviga kurso titoliĝis *Solidare por la nova Afriko* kaj estis organizita por junaj gvidantoj. Unu el pioniroj de la kurso estis B.M. Nsavyimana, instruisto ĉe Universitato de Orienta Afriko. Li klarigis, ke la kurso celas esplori kaj sperti la ideon de socia gvidado, kiu devus enradikiĝi en valorojn kaj tradiciojn de afrika kontinento.

---

Utilaj plantoj:

## Oksikoko

Oksikoko (*Oxyococcus*) estas ĉiamverda, plurjara planto kun longaj, rampantaj vitoj. La vorto devenas el la greka “**acida**” (oksus – ὄξύς) kaj “**bero**” (kokkos – κόκκος). Plejparto (ĉirkaŭ 95%) de oksikokoj estas prilaborita kaj uzata por fari sukcon kaj saŭcon. La resto estas vendata, freŝe aŭ sekigite, al konsumantoj. Oni uzas la fruktojn ankaŭ por kukoj, kompoto, marmelado kaj konfitaĵoj.



Natura medicino konas tiun trajton, ke bone preparitaj oksikokaj fruktoj purigas la korpon de toksinoj. Certaj kemiaj elementoj de oksikoko aktivigas enkorpe kontraŭ bakterioj kaj fungoj.

---